



Unum ovile et unus pastor.
Unu ŝafejo kaj unu paŝtanta.
(Joh., X, 16)

ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO

Oficiala organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista
(I. K. U. E.) de PRO Richardson.

Nia Estonta Jubilea Festo

12¹/₂-jara Ekzistado de IKUE

1 Aprilo 1910 — 1 Oktobro 1922.

„Je la 1^a de aprilo 1910, dum la unua Katolika Kongreso estis fondita en Parizo Asocio de Katolikaj Esperantistoj nomita Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista“.

EK n^o 64 (aprilo-majo 1910), p. 220.

„Mi faris dum mia interparolo kun Mons^{ro} Diepen, kiu estas informita pri ĉio, kio okazis dum „Nia Sesa“ en Hago, la demandon: „Ĉu Via Episkopa Moŝto konsideras la IKUE de Richardson, per la en Hago faritaj decidoj, kiel ne ĉesigitan kaj do kiel ankoraŭ daŭrigatan?“ Kaj Monsinjoro al tiu demando respondis: „Positive jes!“ — Dum la sekvintaj interparoloj Monsinjoro ankoraŭ diris, ke, ĉar al tiu ĉi IKUE nenio estas ŝanĝita en Hago, do ankoraŭ ĝia nuna karaktero estas ankoraŭ tute simila al la estinta kaj ke ĝiaj statutoj ankoraŭ plene valoras.“ (El la parolado de la Prezidanto S^{ro} Pastoor dum la ĝenerala kunveno de „Nederlanda Katoliko“, 6. Januari 1922).

EK n^o 125 (Febr. 1922), p. 124.

Festo agordas la spiritojn al ĝojiĝo. Jam la vorto „festo“ forpelas mallumajn pensojn kaj ekzistigas ĝojajn kaj gajajn sentojn.

Ankaŭ por ni, IKUE-anoj, estos festo! Festo pro la rememoro, kiel la katolikaj Esperantistoj post antaŭperiodo de sep jaroj, en kiu nia EK ludis la ĉefan rolon, fine sukcesis, firmé organiziĝi en

bonordigita organizaĵo. Festo je la rememoro al la multaj sukcesoj, kiujn ni enregistris. Unu el la plej grandaj sukcesoj estis ja la Unua Internacia Katolika Kongreso en Parizo mem, dum kiu nia IKUE estis fondita.

Jam delonge ekzistas la mondo. Sed per Nia Unua komenĉigas nova paĝo en la mondhistorio. — Ĉu tio ĉi estas trograndigo? Ĉu malsaneta eldiro de tro entuziasma fantazio? Ne! Por la unua fojo de post la ekzisto de la mondo tiam okazis io, kio estonte — eble malproksimestonte — estos ĉiutaga regulo kaj kutimo: ke artefarita, internacia helplingvo, elpensita de geniulo kiu videble de la Providenco estis destinita por tio, ekslusive servis kiel unusola ilo por interkomunikado de pensoj dum kunveno de diversnaciuloj... pro kio? Ne, por preparoli tiun lingvon mem, nek por preparoli ties movadon aŭ ties propagandon — la lingvo Esperanto tie estis nenio pli ol kio estas nacia lingvo dum kunveno de samnacionoj: ilo por eldiri la homajn pensojn. La celo de tiu kongreso ne estis tiu ilo, ĝia disvastiĝo, plibonigo aŭ propagando. Kiuj tie kunvenis? Katolikoj. La sola celo intencita estis: preparoligi de Katolikoj katolikajn aferojn, akceli la katolikajn interesojn, servi la katolikismon ekslusive *per Esperanto* kiel lingva ilo. Kaj same kiel dum nacia kongreso ekslusive *per la nacia lingvo* kiel interkomprena ilo estas pritaktataj diverspecaj temoj, same por la unua fojo dum nia unua internacia kongreso ekslusive *per la internacia helplingvo Esperanto* okazis.

Ni *Katolikoj* estis la unuaj, kiuj skribigis tiun unuan *novan* fakton en la paĝoj de la mondhistorio: kaj ja kun tutkora aplaŭdo, kunlaboro kaj benado de la plej altaj Ekleziaj Aŭtoritatoj.

La Eklezio... ho ne! ĝi ne estas kontraŭ la *vera* progreso! Kiom kompreneble estis, ke la granda sed simpleca Papo Pio X spon-tanee levis la manon por benadi, kiam por la unua fojo aeroplano — frukto de la homa genieco — transflugis la Vatikanon. Konser-visto kaj gardisto de la literaturo kaj kulturo de la antikveco, favoranto de artoj kaj sciencoj, fondinto de la unuaj universitatoj ktp. la Eklezio — kiu unualoke havas kiel ĉeftaskon gvidi la homojn al ilia fina Celo, kiu ne troviĝas en tiu ĉi preteriranta mondo — tamen ĉiam estis la protektanto kaj akcelanto de la *vera, efektiva* kulturo kaj progreso ankaŭ sur ne religia teritorio. Denove oni spertis tion tie ĉi — kie temas pri la uzo de internacia helplingvo kiel

nura ilo por atingi eksterlingvajn celojn, dum intence por tio kunvokita kongreso internacia.

Longtempe ni IKUE-anoj restis la unuaj kaj solaj, kvankam la aliaj specialiaj grupoj kaj organizoj esperantistaj okazigis siajn „fakajn kunvenojn“ (same kiel ni katolikoj ankaŭ ĉiam faris antaŭ „Nia Unua“) dum Universalaj Esperanto-kongresoj. Se mi ne eraras, nur tiun ĉi jaron por la unua fojo okazos de ne katolika flanko *tute aparta* kongreso kun la karaktero de Nia Unua, nome la kongreso de la „Sennacieca Asocio Tutmonda“ (S.A.T) en Frankfurt a/M en Aŭgusto 1922.

Kun tiu por ni Katolikoj tiel honora fakto de „Nia Unua“ en Parizo 1910] kunokazis la fondiĝo de nia „Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista“ (IKUE). Festa fakto, kiun ni rememoros la 1^{an} de Oktobro 1922.

Pri tiu jubilea festo ni plue parolos en la sekvontaj EK-numeroj kaj ni nun sekvigas la interesan *antaŭhistorion* de la fondo de IKUE, verkitan de la lerta plumo de P^{ro} Meŝtan.

D^{ro} Smulders.

Nia sankta Eklezio.

Originale verkita de J. Schmidt. (Graz)

Mi scias la plej ĉarman lokon,
la plej trankvilan sur ter'
jen, tie mi volas resti
matene, dum tag'kaj vesper'.

Tre alte ĝi estas lokita
en silentega montar'
kaj ĉirkaŭita per granda
misteroplena arbar'.

Neniu malpaca sono
penetri povas ĝin,
kaj tial regas tre paca
trankvilo tie sen fin'.

Kaj meze de la arbaro
florplena kuŝas herbej',
sur tiu ĉi staras eterne
majesta Dia sanktej'.

De ĉi-sanktejo eliras
la sankta, vivakva font',
forfluas inter la floroj,
ĉar ĝin bezonas la mond'.

Ĝin bezonegas l' homaro,
terure sekega la ter',
por sia reviviĝo
de sia profunda mizer'.

Pro tio do venu vi ĉiuj
kaj ĉerpu el tia trezor',
por nove ricevi vivforton
kaj igi mizeron for.

La sankta Eklezio,
fondita sur Petra rok':
Ĝi vere estas kaj restas
sur tero la plej ĉarma lok'.

La Problemo de Lingvo Tutmonda kaj Historio de Katolika Esperanto-Movado.

DAŬRIGO.

(La komenco troviĝas en la jarkolektoj 1920 kaj 1921).

Bonsento kaj Beno de Papo Pio X.

Ekfloro de la Katolika Esperanto-movado.

En printempo de la jaro 1906 P^{ro} Peltier ricevis de S^{ro} Beaufront leteron, en kiu li skribis al li; Sendu rapide plenan kolekton de „Espero Katolika“ al sinjoro profesoro *Luigi Giambene* en Romo. Li prezentos ĝin al Lia Papo Moŝto kun mia preĝareto.“ Peltier tuj obeis ĝoje kaj la 2-an de Junio, prelato Giambene, tiam sekretario de la grupo esperantista roma „Imperiosa civitas“, estis private ricevita de Pio X-a. Jen la letero, kiun li skribis al Peltier la saman tagon: „La Sankta Patro min tre afable ricevis hodiaŭ matene. Li akceptis vian laboraĵon. Li legis laŭte la poemon de P^{ro} *Dombrovski*, kiu estas en la unua numero, dirante ĉe ĉiu verso: „Mi komprenas!“ (53) — Mi prezentis esperante skribitan peton de beno por vi kaj la redaktoroj de E.K. Ankaŭ ĝin li legis laŭte, kaj poste diris: „Mi ne skribas nun, sed mi sendos al vi skribaĵon pri tio“. Sendube tio estos gravega dokumento. Sed estas nesece, ke ni ankoraŭ silentu pri mia vizito al la Papo. Tuj kiam mi havos novaĵojn, mi skribos al vi. Nun ni silentu, preĝu kaj esperu.“ Peltier atentadis...

La 27-an de Aŭgusto, akurate en la malferma tago de la dua universala kongreso de esperantistoj en Genevo (27 Aŭg.-5 Sept 1906) li ricevis kopion de letero sendita al prelato Luigi Giambene. Jen la originala itala teksto de tiu letero:

53) La bela poezio de P^o Dombrovski, verkita okaze de l'elektigo de la sankta Patro kaj presita sur la unua paĝo de la 1a numero de E.K., havas la titolon: „Al Lia plej sankta moŝto Papo Pio X-a.“ Ĝi laŭvortas:

Ĉesis jam viva malgajo publika
Dio ĝojigis la Kristeklezion:
Sur trono Petra la mond' katolika
Salutas Pion.

Grincu per dentoj infera serpento!
Nin ne timigas jam via envio:
Tra l' maraj ondoj kaj forta la vento
Nin gvidos Pio!

Oni diradu, ke Petra la Ŝtono
Jam detruigis, fariĝas nenio
Granda mensogo! jen sankta la trono
Kaj sur ĝi Pio!

Tial laboru sen tim' Kristanaro
ĝis kiam estos, laŭ vorto de Dio
Unu paŝtisto kaj unu ŝafaro
Vidu ĝin Pio!

Dal Vatikano, 27 Giugno 1906.

Ill^{mo} e R^{mo} Monsignore.

Ho l' onorevole incarico di significarle, che il Santo Padre si è benignamente degnato accogliere con partikolare gradimento i numeri publikati della Rivista „Espero Katolika,“ che Ella gli umiliava da parte del Sac. Emilio Peltier. Voglia la S. V. Ill^{ma} e R^{ma} compiacersi di partecipare al prefato Sacerdote *il Sovrano gradimento e la Benedizione Apostolica, che Sua Santità ha impartito al medesimo ed ai redatteri della Rivista.*

Eseguiti gli ordini ricevuti, passo con sensi di profondo ossequio a profesarmi

All' Ill^{mo} e R^{mo}

Mons. Luigi Giambene, Roma

di V. S. Ill^{ma} e R^{ma}

Devotissimo Servo

Giovanni Bressan.

Esperante: El la Vatikano, la 27-an de Junio 1906.

Via tre respektinda Monsignora Moŝto.

Mi ricevis la honoran komision sciigi al vi, ke la Sankta Patro favoranime kaj kun speciala plaĉo bonvolis akcepti la aperintajn numerojn de l' Revuo „Espero katolika“, kiun vi humile prezentis al Li je la nomo de l' Pastro Emilo Peltier. Bonvolu Via tre respektinta Monsinjora Moŝto konigi al la nomita Pastro la *Papan plaĉon kaj komuniki al li la Apostolan Benon, kiun Lia Sankta Moŝto donis al li kaj al la redaktoroj de ia Revuo.*

Plenuminte la ricevitaĵajn ordonojn kun la sentoj de grandega estimo, mi diras min

De via respektinda Moŝto

Al lia tre respektinda Moŝto

Monsinjoro Luigi Giambene, Romo.

Tre sindonema Servanto

Giovanni Bressan.

La granda novaĵo rapide dissemiĝis ne nur inter la katolikoj, kiu partoprenis la universalan kongreson, sed inter ĉiuj kongresanoj, kaj P^{ro} Peltier ricevis multe da afablaj gratuloj. Ĉiuj ĵurnaloj Ĝenevaj publikigis la francan tradukon de l' letero.

Dum la sekvantaj tagoj multaj esperantistoj esprimis la deziron, ke la letero Papa estu legata dum la ĝenerala konsido de l' kongreso. Tio fariĝis. Laŭdezire, la prezidanto de l' kongreso, pastro *Schneeberger*, protestanto, komunikis la leteron al la kongresanoj. „Nia amikoj, la katolikoj“, diris la prezidanto. „ricevis de l' Papo altan aprobon, kiun mi komunikas al la kongreso“. La legado de la letero estis salutata per unuanimaj kaj longaj aplaŭdoj de l' kongresanoj. S^{ro} *Carlo Bourlet*, kvankam liberpensulo, deklariis, ke tiu fakto estas tre grava por la progresado de Esperanto kaj ke li ĝin tre plezure aplaŭdas. Li esprimis la deziron, ke la anoj de aliaj religioj aŭ filozofioj same klopodu por ricevi similan aprobon de la estroj por montri, ke esperanto estas vere neŭtrala lingvo, kiu povas kaj devas utili al ĉiuj partioj kaj ideoj.

Peltier mem ne eĉ unu momenton konsideris la Benon Apostolan kiel kuraĝigon al si persone donitan, sed kiel *supernaturan helpon*, kiel *altan aprobon de la celo de „Espero Katolika“*: *utiligi Esperanton por la dissemado de la Vero Katolika kaj por la trata unuiĝo de ĉiuj homoj en unu ŝafaro*. De nun li sentis sin pli forta por la granda laboro, li intime ankaŭ sentis, ke li povus, ke li devus iri antaŭen. Kaj li iris, sentime, senlace ĝis morto.

Dankecaj telegramoj estis senditaj de la kunveno de la katolikoj en Ĝenevo al la Sankta Patro Pio X-a kaj al la ĉefepiskopo de Tours, Mons^{ro} Renou.

Alia grava okazintaĵo en la Ĝenevo kongreso estis la oficiala permeso de tiea katolika Ĝenerala Vikario por la prediko en Esperanto. P^{ro} Peltier ne bezonis peti tiun permeson, la Ĝenerala Vikario mem tion proponis. La katolikaj esperantistoj solenigis sian Diservon en la bela nova preĝejo S. François la 2-an de Septembro. Patro Guinart el la ordono el l' Piaristoj (Ordinis Scholarum Piarum), Vic-prezidanto de l' hispana societo p.p.E. faris la meson. Post la legado de l' Evangelio P^{ro} Peltier, la unuan fojon en la mondo, predikis en Esperanto, Emocio komprenebla vidiĝis sur lia vizaĝo, kiam li supreniris al la predikejo.

Dum la sankta meso estis kantataj „Patro Nia“. „El ĉiuj landoj“, nova kanto al la Sankta Virgulino: „Senmakula“ laŭ Belga muziko esperantigita de S^{ro} Wemaes, la 70-jara esperantisto el Loveno; fine la lasta ĥoro de „Esther“, eltirata el la traduko de D^{ro} Noel. En la preĝejo ĉeestis ĉirkaŭ 300 personoj, kies proksimume 200 estis esperantistoj.

Tie ĉi estu menciita ankaŭ² la deziro esprimo de l'Kongreso, *ke dum ĉiuj kongresaj konsidoj nur Esperanto estu parolata*, kaj la plua deziro, ke la Lingva Komitato elektata nur provizore en la Bulonja kongreso, restu definitiva kaj publikigu aldonon al la Universala Vortaro.

La *Centra Oficejo*, fondita en Bulonjo, formis *Esperantan bibliotekon kaj arĥivon*. — La diskonigo de Esperanto inter la unuiĝoj de l' *Ruĝa Kruco* estis proponata.

Kr^{om} la agadoj kunsidaj de l' kongreso, okazis 23 apartaj kunestoj de fakanaroj.

Same kiel la 1^a kongreso donis grandan anktaŭenpuŝon de la esperanto-movado en Francujo, kiu honoris D^{ron} Zamenhof oficiale per kruco de l' Honora Legio, la Ĝeneva multe akcelis la progresojn de l' Esperanto en Svisujo kaj Eŭropo ĝenerale (R. de Ladevèze, Demandaro pri historio, literaturo kaj organizaĵoj de Esperanto 1911. Friedrich Adler, Esperanto-Verlag. Dresden-A)

La kongresanoj katolikaj disiris tre fortikigitaj spirite, kaj ĉiu el ili fariĝis pioniro de la Kat. Esp. movado, kiu post la Ĝeneva kongreso tuj komenciĝis pli energie kaj ĉie ekfloris.

La vigla intereso, kun kiu Papo Pio X kondukis rilate al la katolika esperanto-movado malgrandigis videble la nombron de kontraŭuloj. La gazetoj, ekz. la katolika ĵurnalo „La Croix”, donis tre favorajn noticojn pri „Espero Katolika.” Oni tradukis en Esperanto ekleziajn himnojn por la katolika diservo. Oni komencis zorgi por la eldono de nova katolika preĝareto.

Ĝi estis eldonata dum la jaro 1907a de P^{ro} Em. Peltier kun Imprimatur de Mons^{ro} Renou, ĉefepiskopo de Tours.

* * *

Ĉiuj katolikoj kapablaj kanti estis invitataj dum la tria kongreso en *Cambridge* partopreni en la aranĝata katolika ĥoro. Unu el katolikoj pastroj movigis eĉ la demandon pri la organizo de Internacia Oficejo ĉe la Vatikano. Tiu ĉi oficejo uzante la lingvon Esperanto povus faciligi la rilatojn de katolikoj en Romo kaj farus grandegan servon al la tutmonda katolikaro.

P^{ro} Peltier siaflanke por la ĝenerala kunveno de katolikoj dum la tria universala kongreso preparis detalajn projektojn de *tri novaj* katolikaj organizacioj:

1. Projekton de kooperativa societo por la propagando de katolika vero per Esperanto, similan al la angla societo de katolika vero.

2. Projekton de „Frataro de katolikaj esperantistaj pastroj”, havanta la celon unuigi la katolikajn pastrojn diversnaciajn por faciligi inter ili per Esperanto rilatojn pri pastraj sciencoj kaj ĉiuspecaj religiaj aferoj, kaj

3. Projekton de societo „La Abelo Esperantista” aŭ amika unuiĝo de katolikaj komercistoj kaj industriistoj por faciligi al ili komercajn internaciajn rilatojn.

La tria esperantista kongreso, kiu okazis en Cambridge de la 12-a ĝis la 17-a de Aŭgusto 1907-a, havis grandegan sukceson. Inter la diversaj proponoj akceptitaj de l' kongreso estu tie ĉi citata tiu de S^{ro} R. de Saussure, kiu tiam prezentis, en kunsido de la ĵus fondita *Scienca Asocio, la spresmilan sistemon*, bazitan sur la angla ora funtvaloro). Tiu sistemo iom post iom uziĝis kaj baldaŭ S^{ro} H. F. Höveler (E. Ĉefeĉ), konata pro siaj bonegaj multlingvaj „*ŝlosiloj*” fondis en Londono *ĉekbankon Esperantistan*.

La katolikaj kongresanoj aranĝis sprecialan Diservon en Church of our Lady and the English Martyrs (preĝejo de Nia Sinjorino kaj de la anglaj martiroj) dimanĉon la 11-an de Aŭgusto. P^{ro} Parker, irlandano, diris la s. meson, P^{ro} Richardson, konvertita Anglikano, diris la predikon, post kio li donis la Papan Benon al la grandnombre ĉeestantaj esperantistoj. Plezure oni faris rimarki, ke por la *unua fojo* la vortoj „tria kongreso esperanta” troviĝas en oficiala dokumento, kiaj estis la Reskriptaj leteroj

alsenditaj por prelato L. Giambene. La Sankta Patro benis la esperantistajn katolikojn kunvenintaj ĉe „esperanta“ kongreso. Oni povas konsideri tion kvazaŭ peran aprobon de la agado de la katolikaj esperantistoj.

En la festo de Asumcio okazis alia meso dirita de P^{ro} Richardson, P^{ro} Frohns, germano, predikis. — Dum ambaŭ mesoj estis kantataj belaj kantoj, inter ili „Patro Nia“ verkita de Joh. Gothardt, „Preĝo al Mario“ tradukita de S^{ro} Joh. Schöder kaj la dueto de Mendelsohn: „Milfoje, ho feliĉa“ el la tragedio „Athali“, tradukita de S^{ro} Noel.

En la ĝenerala kunveno laŭ projekto de P^{ro} Richardson estis fondita nova societo sub la nomo „Societo Katolika Internacia (S.K.I.)“ kaj estis akceptita la projekto de „Pastra esperantista Frataro“ (P.E.F.)

La projekton de P^{ro} Peltier pri la kooperativa societo por la propagando de katolika vero per Esperanto la kongresanoj trovis ankoraŭ neopartuna.

P^{ro} Peltier pro malsano ne ĉeestis. En ĝenerala kunveno estis nur legita lia letero, en kiu li sciigas pri la intencata fondo de sia *Esperanta presejo*.

Post la sukcesplena kongreso, D^{ro} Zamenhof estis plej gasteme kaj oficiale akceptata en Londono kaj faris en „Guildhall“ sian trafan paroladon pri „Esperanto kaj patriotismo.“ Ni eltiras el tiu parolado la jenajn paragrafojn, al kiuj ni katolikaj esperantistoj tutkore konsentas:

„... La dua kulpigo, (54) kiun ni ofte devas aŭdi estas tio, ke ni esperantistoj estas malbonaj patriotoj. Ĉar tiuj esperantistoj kiuj traktas la Esperantismon kiel ideon, predikas reciprokan justecon kaj fratecon inter la popoloj kaj ĉar laŭ opinio de la gentaj ŝovinistoj patriotismo konsistas en malamo kontraŭ ĉio, kio ne estas nia, tial ni laŭ ilia opinio estas malbonaj patriotoj, kaj ili diras, ke la esperantistoj ne amas sian patrujon, Kontraŭ tiu ĉi mensoga, malnobla kaj kalumnia kulpigo ni protestas plej energie, ni protestas per ĉiuj fibroj de nia koro. Dum la pseŭdopatriotismo, t. e. la genta ŝovinismo estas parto de tiu komuna malamo, kiu ĉion en la mondo detruas, la vero patriotismo estas parto de tiu granda tutmonda amo, kiu ĉion konstruas, konservas kaj feliĉigas. La Esperantismo, kiu predikas amon, kaj la patriotismo, kiu ankaŭ predikas amon, neniam povus esti malamikaj inter si. Ĉiu povas paroli al ni pri ĉiuspeca amo, kaj ni kun danko lin aŭskultos; sed kiam pri amo al la patrujo parolas al ni la ŝovinistoj, tiuj reprezentantoj de abomeninda malamo, tiuj mallumaj

(54) Per siaj antaŭaj vortoj D^{ro} Zamenhof defendis la netuŝeblan fundamenton kontraŭ tiuj kiuj pensis, ke se oni farus tiujn plibonigojn, kiujn ĉiu el ili proponas, la Esperanto-afero iros multe pli bone.

demonoj, kiuj ne sole inter la landoj, sed ankaŭ en sia propra patrujo konstante instigas homon kontraŭ homo — tiam ni kun la plej granda indigno nin deturnas. Vi, nigraj semantoj de malpaco, parolu nur pri malamo al ĉio, kio ne estas via, parolu pri egoismo, sed neniam uzu la vorton „amo“, ĉar en via buŝo la sankta vorto „amo“ malpuriĝas.

„Vi staras nun antaŭ miaj okuloj, mia kara Litovujo, mia malfeliĉa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi, kvankam mi forlasis vin kiel juna knabo. Vi, kiun mi ofte vidas en miaj sonĝoj, vi, kiun nenia alia parto de la tero povas anstataŭi en mia koro, vi atestu, kiu vin pli multe, pli kore kaj sincere amas: ĉu mi, idea esperantisto, kiu revis pri frateco inter ĉiuj viaj loĝantoj, kvankam mi devis bedaŭrinde forlasi vin, simule al multaj centoj da miloj da aliaj viaj filoj — aŭ ĉu tiuj personoj, kiuj deziras, ke vi apartenu nur al ili, kaj ĉiuj aliaj viaj filoj estu rigardataj kiel fremduloj aŭ sklavoj. Ho patriotismo, patriotismo. Kiam fine la homoj lernos kompreni ĝuste vian sencon! Kiam via sankta nomo ĉesos esti armilo en la manoj de diversaj malhonestuloj! Kiam fine ĉiu homo ricevos la rajton kaj la eblon algluiĝi per sia tuta koro al tiu peco de tero, kiu lin naskis!

„Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj. Anstataŭ konstante batali inter si, elŝiri la patrujon unuj al la aliaj, perforte altrudi al si reciproke siajn lingvojn kaj morojn, ili vivos inter si pace kaj frate, en plena interkonsento ili laboros sur la tero, sur kiu ili vivas, kaj kontraŭ tiuj krudaj fortoj de la naturo, kiuj ilin ĉiujn egale atakas. Kaj kune kaj interkonsente ili celados ĉiuj al unu vero, al unu feliĉo. Kaj se iam venos tiu feliĉa tempo, ĝi estos la frukto de konstanta kaj senlaca laborado de... „Esperantistoj“. —

La katolikaj kongresanoj, post la tria kongreso disiris tre fortigitaj kaj ĉiu el ili fariĝis pioniro de la konstante pligrandiĝanta Esperanto-movado. En *Belgujo* multe laboradis la grupo „*Excelsior*“ tradukante en Esperanto diversajn katolikajn verkojn. En *Irlando* tre fervore agadis *Pr^o Parker*. En *Francujo* tre sukcese propagandis Esperanton inter katolikaj grupoj de junuloj *S^{ro} Cl. Colas*. En *Ameriko* „*The catholic Home Journal*“ en *St. Louis* dediĉis multajn paĝojn al Esperanto. *S^{ro} Ĉefeĉ* fondis esperantistan grupon en la insulo *Madeira* en tiea katolika seminario. En *Chili* sin organizis la grupo de „junularo katolika Chila.“ Plue en Germanujo, Anglujo, Danujo, Nederlando, Italujo, Aŭstrujo, Hungarujo, Rusujo kaj Palestino vico da altmeritaj viroj sukcese laboradis sur la esperantista kampo.

(*Daŭrigota*)

Pr^o F. Meŝtan.

Katolika Vivo Internacia

Centra Oficejo de Katolikaj Organizaĵoj.

Definitiva Sidejo: Romo.

Provizora Adreso: 19 Juliana van Stolbergplein — Hago, Nederlando.

En EK n^o 125, p. 100-104 ni komunikis la cirkuleron de tiu ĉi gravega organizaĵo, kiu ĉie estas tiel simpatie salutita.

Oni scias, ke la **unua Fondanto** estas L. S. M. **Papo Benedikto XV**, kiu donacis 25.000 lirojn.

En privata aŭdienco konsentita de L. S. M. **Papo Pio XI**, la sepan tagon de lia glora pontifikeco, al la sekretario de la Ĝenerala Komitato: Prof^o D^o Alphons Steger (Hago, Nederlando), la Sankta Patro bonvolis doni specialan benon al la afero, al ĝiaj kunlaborantoj kaj fondantoj, kaj donacis al ĝi 10.000 frankojn.

Sur la **unua** ekzemplero de la **unua** oficiala portreto de Papo Pio XI troviĝas jenaj vortoj:

Beatissime Pater,

Alphonsus Steger, ante pedes vestrae Sanktitalis humiliter provolutus, benedictionem specialem pro opere quod dicitur:

„Concilium Centrale Societatum Catholicarum”

ejusdemque collaboratoribus et fundatoribus supplicare audet.

Romæ, die XVIII Februario MCMXXII.

*Ex corde benedicente
Pius P.P. XI.*

La per kursivaj literoj presitaj vortoj estis propramane skribitaj de la Sankta Patro sub la benpeto.

Jen la esperantlingva traduko:

Alphonsus Steger, antaŭ piedoj de Via Sankteco humile genufleksinta, benon specialan por la afero nomita:

„Centra Oficejo de Katolikaj Organizaĵoj”

kaj por ties kunlaborantoj kaj fondantoj kuraĝas petegi.

Romo, 18 Februaro, 1922. —

*Elkore benante
Pius P.P. XI.*

La Sankta Patro diziras, ke unualoke baldaŭ estu prizorgata la kapitalo por la efika funkciigo de la Centra Oficejo. Kiu, kiel Papo Benedikto XV, donacas 25000 lirojn aŭ ekvivalento de tiu sumo, estas fondanto. Papo Pio XI tuj donis, kiel komencan donacon, 10.000 frankojn. Ĉiu mondonaco estos danke akceptata, eĉ la „speseto de la vidvino” (Vidu la detalojn, ankaŭ la nomojn de la internacia Komitato, en EK n^o 125).

Kiel oni scias, en ĉiu lando **unu** al la Princoj de la Eklezio estis invitata fariĝi Honora Membro de la Centra Oficejo. Krom la en la cirkulero (EK 125) menciitaj 10 **Kardinaloj** (Irlando, Portugalujo, Anglujo, Hispanujo, Hungarujo, Aŭstrujo, Francujo, Germanujo, Italujo kaj Usono) kaj 5 **Episkopoj** (Nederlando, Ĉeĥoslovakujo, Brita Hindujo, Argentino kaj Coire) plue aliĝis al la honora Komitato:

Kardinalo Louis Begin, Ĉefepiskopo de Quebec (Kanadujo);
kaj iliaj Episkopoj Moŝtoj:

Raymond Netzhammer, Ĉefepiskopo de Bukarest (Rum.);

Adolfo Nouel, Ĉefepiskopo de St. Domingo (sud. Am.);

Franciscus Mendoza, Ĉefepiskopo de Durango (Sud. Amer.);

Antonius Bauer, Ĉefepiskopo de Zagreb (Agram), Jugo-Slav;

Giovanni Vallega, Ĉefepiskopo de Smyrna (Grek.);

Damien Theelen, Episkopo de Nicopolis (Bulg.);

Petrus Nommesch, Episkopo de Luxemburg;

George Bruley des Varannes, Episkopo de Monaco;

Albertus Bitter, Episkopo de Doliche, Vikario Apostola de Svedujo;

Johann Fallize, † Episkopo de Elusa, Vik. Apost. de Norvegujo kaj Spitzburg.

Johann von Euch, † Episkopo de Anastasiopolo, Vik. Ap. de Danujo kaj Islando. —

Koncerne Nederlondon, kie la Katolikoj estas bonege kaj ĉiurilate organizitaj: ĉiuj organizaĵoj, kiu estas aliĝintaj al la granda Nederlanda centra organizo „*Katolika Sociala Agado*“, jam anoncis sin kiel membrojn de la Centra Oficejo, same kiel aliaj katolikaj Asocioj.

Dum nia Sepa certe ankaŭ la IKUE de Richardson decidis aliĝi al tiu ĉi gravega Centro de la internacia katolika agado.

D^{ro} *Smulders*.

N.B. Oni povas, krom en la ĉefaj naciaj lingvoj, ankaŭ korespondi kun la Sekretariejo **Esperantlingve**.



Katolika Esperanto-Movado

Senpartia Opinio de Neŭtralulo.

Ne pro tio, ke niaj legantoj trovas en suba artikolo multe da novaĵo, sed *kiel grava historia dokumento* ĝi devas esti presata en EK. La konata S^{ro} Friedrich Ellersiek, antaŭmilita redaktoro de „Germana Esperantisto“, sed nun la eldonanto kaj ĉefredaktoro de „**Esperanto-Praktiko**, Monata gazeto por perfektigo en la Lingvo Internacia“ (Esperanto-Verlag, Wissmannstr. 46, Berlino S 59), bonafide presigis, erarigita de la teruraj konfuzoj, okaze de la eliro de la unua numero de K.M.: „Espero Katolika mortis — vivu Katolika Mondo“. — Al tio venis protestoj niaflanke kaj el la respondo de S^{ro} Ellersiek jam montriĝis, ke li bonafide kaj ne malbonintence skribis tiun frazon en E.P. — Granda surprizo estis, trovi en E.P., Marto 1922, p. 58, suban, eĉ por la erarigitaj Katolikoj tre instruigan, tute senpartian prijuĝon pri la bedaŭrinda konflikto. :

„Ĉu I.K.U.E., ĉu IKa?“*

Inter la katolikaj esperantistoj tutmondaj grava disputo ekestis. Per riproĉindaj manipuladoj oni disigis la katolikan esperantistaron en du partiojn, kio estas tiom pli mallaŭdinda, ke eĉ opaj partianoj ne ĝuste sciigis pri la kialo. Oni ankaŭ intence trompis la publikon, kion montras la neĝustaj raportoj en la gazetaro. Kun intereso, sed samtempe kun bedaŭro, mi sekvis la aferon, kaj por heligi la mallumon, mi permesas al mi la parolon pri ĉi tiu temo. Mi estas nek IKUE-ano nek IK-ano, eĉ ne katoliko; do mi certe devas pretendi, esti aŭdata kiel neŭtralulo.

La katolika Esperanto-movado datumas de la jaro 1903. Sed nur en la jaro 1910 Pro Richardson organizis ĝin dum la unua kongreso katolika en Paris sub la nomo Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE). La oficiala organo de tiu ĉi unuiĝo fariĝis la internacia monata gazeto *Espero Katolika* (EK). Ĝia celo estis la propagando kaj disvastigo de Esperanto en katolikaj rondoj — do pure poresperanta. Ĝi havis la aprobon de la eklezio katolika.

Pro la eksplodo de la mondmilito oni devis ĉesigi la propagandon, kaj ankaŭ la eldono de EK estis ĉesigata. Post la mondmilito (1920) EK estis provizore eldonata en Aŭstrujo [Wien]. La movado inter katolikoj nun reviviĝis, kaj oni decidis okazigi la VI^{an} internacian kongreson de IKUE. La prezidanto de IKUE, pastro Parker, retenita pro politikaj kaŭzoj en sia patrujo Irlando, elektis pastron Poell prezidanto de la VI^a por reprezenti lin. La ĉefpunkto de la tagordo pri-traktota dum la kongreso estis la IKUE-regularo. Sed la reprezentanto kaj anstataŭanto de Pro Parker flankenmetis ĉi tiun gravan diskutotajon, kaj oni okupis sin pri aliaj aferoj, inter ili pri starigo de katolika internacio, deklarante, ke IKUE jam de longe estas la internacio katolika. [Komparu la tragedion Esperanto-Ido!] Ĉi tiu kreaĵo ricevis la nomon „Internacio Katolika“ [IKa]. Do oni perforte altrudis la IKan al la organizitaj katolikoj esperantistaj. Prezidanto fariĝis Pro Poell, sed

* Per ĉi tiu artikolo, kiun la verkinto skribis konsiderante ankaŭ la enhavon de *Espero Katolika* n-o 124, mi definitive fermas en E.P. la diskutadon pri la malaĝrabla temo. Cetere ŝajnas, laŭ E. K. n-o 125, ke la paco inter la du partioj restariĝos.

pro multaj laboroj li lasis al D^{ro} Metzger, prezidanto de Blanka Kruco, la absolutan prezidantecon.

Efektive IKUE ne estis mortinta, tamen neniu defendis publike la asocion atakitan de IKa, eĉ ne la reprezentantoj de IKUE: „oni ne volis influi la alilandulojn” Ĉu tio estis la ĝusta rimedo, por ne konfuzi la katolikan esperantistaron, mi pridubas. La katolikaj esperantistoj eĉ ne eksciis, ke IKa ne estis aprobita de ĉiuj ekleziaj aŭtoritatoj! Do la plejmulto agis en bona kredo, sekvante nun la novan asocion „IKa”

IKa tamen ne reprezentas la *esperantistojn* katolikajn, sed ĝi laboras nur por ĝeneralaj tendencoj katolikaj. Do ĝi ne estas Esperanta entrepreno, sed similas al la socialista internacio. La nura konferenca lingvo ne estas Esperanto, sed ĉiuj lingvoj estas permesataj. Tamen oni volis preferi la lingvon Esperanto kaj iom post iom esperantistigi la anojn. Kiel organon de IKa oni eldonis novan gazeton „Katolika Mondo” [K. M.].

Iom post iom la katolikaj esperantistoj ekkonis, ke ĉi tiu vojo ne estis la ĝusta, kaj oni deziris kaj esperis, ke dum la XIII^a Universala Kongreso en Praha oni trovos la solvon. La kongresa komitato de la XIII^a aranĝis — kiel estis kutimo dum la antaŭmilitaj universalaj kongresoj — ankaŭ fakan kunvenon por katolikoj. Sed ne okazis faka kunveno de katolikaj esperantistoj, ĉar ili estis perforte silentigitaj de IKa-anoj. Anstataŭ tio oni aranĝis IKa-antaŭkonferencon. La IKa-konferencon oni okazigis kelkajn tagojn post la XIII^a en Graz.

La konferencanoj nur malplejparte estis esperantistoj, ĉefe oni parolis germanlingve. Interalie oni pritraktis tie la demandon ĉe IKUE, ĉu IKa? La reprezentanto de IKUE defendis esperantlingve sian unuiĝon; D^{ro} Metzger siaflanke faris kontraŭparoladon esperantlingvan por IKa. Lian paroladon D^{ro} M. tradukis en germanan lingvon, sed li ne faris la samon rilate al la parolado de la IKUE-representanto. Do la ne-esperantistoj tute ne povis kompreni la argumentojn de la lasta. Malgraŭ tio oni voĉdonigis la ĉeestantaron; sekvo de tio estis, ke la rezolucio de D^{ro} M. estis akceptata.

Laŭ n-ro 2 de Katolika Mondo, kies ĉeftitolo estas „Universala organo por tutmondaj interesoj katolikaj” kaj kies kromtitolo tekstas „Oficiala internacia organo de Internacio Katolika [IKa], de Internacia katolika Unuiĝo Esperantista [IKUE], de Mondjunularo Katolika [Moka] kaj de Blanka Kruco [Internacia Misio Katolika]” (ĉu sufiĉas?!), oni kreis komence de 1921 novan lingvon de la naciaj katolikaj esperantistaj societoj, kiu alprenis la nomon de la antaŭa IKUE.

Ekzistas do nun du IKUE! Unue la IKUE de P^{ro} Richardson kaj due la IKUE de Graz. Kiu el ambaŭ nun estas la rajtigita de la katolika esperantistaro? La kompetentuloj de IKUE de P^{ro} Richardson asertas tion (vidu EK n-ro 124) same kiel la gvidantoj de IKUE de Graz (vidu „Esperanto,” n-o 1/1922, pĝ 16 sub „Tra la Fakoj”).

Laŭ mia konvinko la lastaj ne rajtas uzi la nomon IKUE. La IKUE de Richardson ne ĉesigis pro la mondmilito sian ekzistadon. Kiel ĉiuj organizoj ankaŭ IKUE dum la milito nur ne povis daŭrigi la propagandon. Post la milito ĝi reviviĝis kaj daŭrigis denove la laboron. Do morale ĝi sola rajtas sin nomi IKUE. Laŭleĝe oni ja ne povas malpermesi al iu societo katolika, alpreni la nomon IKUE, ĉar la nomo ne estas patentita, sed ĝis nun ne estis kutimo inter esperantistoj, misuzi la nomon de ankoraŭ ekzistantaj societoj. Afero de la katolikaj esperantistoj mem estos, malaperigi la IKUE-surogaton de Graz kaj restarigi la pacon inter la esperantistaro, aliĝante grandnombre kaj unuanime al la sola esperantista unuiĝo katolika aprobita de la eklezio: IKUE de Richardson. La VII^a Internacia Katolika Kongreso de IKUE de Richardson en aŭgusto 1922 montros, ĉu IKUE de Richardson havas la konfidon de la katolika esperantistaro aŭ ne.”

Goho.

Presinte supran prijuĝon ni konstatas, ke ĝenerale la prijuĝanto bonege redonis la efektivan situacion. Ne por kritiki, sed por kompletigi, mi ankoraŭ volas rimarki, ke la karaktero de IKUE de Richardson estas klare priskribita de mi en EK n^o 126,

p 143. — La verkisto pravus, ke la misuzo de la nomo „IKUE“ ne povas esti malpermesata: ĉar tiu nomo ne estas patentita; — tamen EK estas eldono de la laŭleĝe starigita Akcia Societo EK, kaj ĝi sola havas la laŭleĝan rajton nomi sin „Oficiala Organo de IKUE.“ (Statutoj art. 2). Tion ankaŭ tuj rekonis la prezidanto de IKa, D^{ro} Griesswein [EK, n^o 1 24, p. 40], kiu tion sciigis al D^{ro} Metzger en Aŭgusto 1921, do *antaŭ* ol tiu ĉi almetis tiun titolon al lia gazeto KM; — tamen kontraŭ la averto de la prezidanto de IKa D^{ro} Metzger konscie por la unua fojo en KM 2 elirinta 15 Oktobro 1921, almetis tiun titolon, kiu laŭ la „ŝtatleĝo pri aŭtorrajto“ apartenas al EK sola. — Ankaŭ pri la konfuzigo, nomi la graz'an Unuiĝon „IKUE“, mi atentigis en Aŭg. 1921 D^{ron} Griesfwein. petante ke tiu nomo almenaŭ estu ŝanĝata. Mi tre miris, ke D^{ro} G. — kiu tiam verŝajne ne bone komprenis la situacion — ne ankaŭ malaprobis tiun malkorektan agon.

Al la kongreso de la IKUE de R. kompreneble ne partoprenos *ĉiuj* Katolikaj Esperantistoj, precipe ne tiuj, kiuj nepre kaj fanatike volas daŭrigi la konflikton. Ni lasas al ĉiuj la plenan liberecon, sed nepre postulas ĝin ankaŭ por ni mem, kiuj *prave daŭrigas* la laŭhistorian katolikan Esperanto-movadon, organizitan en IKUE kaj EK. Tiu *daŭrigo* kompreneble ne estos iel influata, se ne partoprenos la plej fanatikaj Metzgeranoj. Sen ili tiu daŭrigo estas **fakto**, rekonita i.a. de la Eklezia Aŭtoritato.

D^{ro} Sm.

La klopodoj, interkompreniĝi kun IKa.

Estas granda diferenco, ĉu la intertraktado por tiuj-ĉi aferoj fariĝas per persono de D^{ro} Metzger influita, aŭ sendependa de D^{ro} Metzger, ĉu skribe, ĉu persone.

Tion oni rimarkis lastfoje ĉe la preparolado de la Sappl'a propono. Ĉiu leganto rimarkis, ke tiu-ĉi propono venis el la skribejo de D^{ro} Metzger kaj ke S^{ro} Sappl nur donis sian nomon. Malgrau tio oni preparoladis kaj pritraktis ĝin en nia organo. Estas nur bedaŭrinde, ke la Metzgeranoj ne ankaŭ estas tiel sinceraj, ĉar ili nur aldonis apartan papereton al KM, en kiu ili al tiuj legantoj, kiuj estas IKUE-anoj kaj nur trompitaj per la konkurenca fondo de KM, sciigas pri la klopodoj de la interkompreniĝo. Kial ili ne tuj sciigis tion en KM mem?

Tute alispeca estas intertraktado kun la nuna IKa-prezidantaro. En la lasta tempo D^{ro} Hotzelt oferis sian tempon kaj vojaĝis, invitite de S^{ro} Prof. W. Arnold en Zug, en la Svisujon, por plentute preparoli la diferencojn inter IKUE kaj IKa.

La rezultato ne povas esti la jena, ke nun estas la tuta demando solvita. Sed oni ĉe ĉiu flanko konvinkiĝis, pri la bona volo de la alia. S^{ro} Arnold tre interesiĝis pri la veraj okazintaĵoj ĉe la

fondo de Ika kaj pri la vera kialo de la bedaŭrinda batalo inter la katolikaj Esperantistoj.

La opinio de la Ika-prezidanto S^{ro} Arnold nun estas, ke certe la fondo de Ika estas bedaŭrinda manko por ĝi; sed ni staras antaŭ iu „fait accompli” (sed tiun-ĉi fait accompli D^{ro} Metzger konscie intencis fari, por ĉiuokaze certigi la sukceson de sia fondaĵo!) S^{ro} Arnold estas konvinkita, ke Ika devas rebonigi ĉion, kion malutilis la konduto de D^{ro} Metzger al IKUE kaj promesis, ke la Ika-registaro faros ĉiun studadon, konduki la konflikton al ĉiuflanke justa solvo kaj tiamaniere forigi el la mondo la batalon.

Nun ni povas havi la esperon, ke venos la paco inter la katolikaj fratoj,

* * *

Al la plejmultaj katolikaj Esperantistoj estas konata, ke en Germanujo, kie ĉefe estas la bazo de D^{ro} Metzger, estis forsendita per la sudgermanuja grupo de „Buked” flugfolio, kiu priklarigis la konfuzan staton en nia movado kaj anoncis la plenan priklarigon per la denove aperanta „Espero Katolika” Kontraŭ tiu-ĉi flugfolio D^{ro} Metzger forsendis tri aliajn flugfoliojn, unu subsignita de li, unu de S^{ro} Prel. Giesswein, unu de S^{ro} Prof. Arnold kaj de Kasper Mayer. Malgraŭ ke la du S^{roj} Prezidantoj estis dezirintaj, ke ilia nomo estu kune sub ĉiu manifestado, D^{ro} Metzger aranĝis tion alie. Plue la manifestadon de S^{ro} Prel. Giesswein li tiel mallongigis, ke la senco de la manifestado estis tute aliigita. Ni pro tio volas publikigi la aliajn tre signifajn frazojn de S^{ro} Prel. Giesswein; ili eĉ estas plej atentindaj por la interkompreniĝo.

„2. Mi ne povis ĉeesti la Hagan katolikan Esp. Kongreson, „pro tio mi ne estas sufiĉe informita pri la tieaj okzintaĵoj. Tamen „mi ricevis la impreson, ke tie kelkaj certe per bona volo, sed „per iu trorapidigo estis decidataj, *kio devas esti reordigata kun „kristana amo kaj justeco.*

„3. Laŭ mia opinio povas kaj devas ekzisti la IKUE kaj „Ika kiel tute memstraraj organizaĵoj, ĉiu kun ĝia aparta celo „unu apud la alia kaj helpi unu la alian. IKUE volas antaŭ ĉio „propagandi Esperanton en la katolikaj rondoj kaj per tio ankaŭ „pretigi la vojon al la interkompreniĝo inter la Katolikoj. Ika „havas la celon, fondi internacian organizaĵon de la interkom- „preniĝo inter la katolikaj popoloj kaj uzas por tio, se ankaŭ „ne eksklusive Esperanton kiel antaŭenpuŝanta ilo. En tiu-ĉi „senco ankaŭ servu la organo de IKUE, Espero Katolika, kaj „tiu de Ika, Katolika Mondo, al la speciala celo de la tiu-rila- „taj organizaĵoj, Ambaŭ organizacioj agadu ne konkurencante, „sed kune agante kaj helpante unu la alian.”

Ni ĉiam estis konvinkitaj, ke S^{ro} Prel. Giesswein havas la plej

bonan intencon, kiu ankaŭ parolas el liaj vortoj. Ankaŭ aliloke S^{ro} Prel. akcentas „ke li ĉiam restos fidela al IKUE kaj volas defendi ĝiajn rajtojn” Sed unu eraron de S^{ro} Prel. Giesswein ni devas korekti: en nia batalo kontraŭ D^{ro} Metzger ne temas pri IKUE aŭ IKa, sed pri la trompa fondo de IKa kaj pri la perforta klopodo, mortigi la IKUE kaj pri la daŭrigata provo de la Metzgera oficejo, malpelpi nin. Oni nur komparu tiujn-ĉi frazajn de S^{ro} Prel. Giesswein kaj la frazaĉojn ne KM (N^o 4) je la sama tempo!

Esperanto kaj la Katolika Junularo.

Miaj klarigoj pri la historio de Esperanto inter la katolikaj junuloj trovis grandan intereson. Memkompreneble kelkaj personoj kredis sin per ili ofenditaj. Inter ili estas la unua S^{ro} Sappl, la Metzgera oficiato de la tielnomita Moka. Mi ĉiam atendis lian intencitan proteston kontraŭ mia artikolo, sed ĝi ne alvenis. Pro tio mi nur volas respondi tion, kion S^{ro} Sappl persone skribis al mi.

S^{ro} Sappl diras multon pri siaj laboroj por Moka, kiujn mi nek preparolis, nek ofendis. Sed li ne diras ion kontraŭ mia historio de la Esperanto-movado inter la katolikaj junuloj, ĉar ĝi estas vera. S^{ro} Sappl iomete malkuraĝiĝis aŭdinte, ke IKUE volas havi ĝian junularorganizon, kaj timis konkurencon al sia Moka. Sed, S^{ro} Sappl, Vi tute malkomprenis mian intencon! Ni ja volas kolekti niajn per Via agado disigitajn junulojn, sed ni ne volas fondi ion tute novan, ni nur anoncis nian nediskuteblan pretendon je la tielnomita Moka!

Ĉar, kiel mi pruvis en mia artikolo, Moka estas nia organizaĵo! Haviginte al si la katolikan Esperanto-movadon, D^{ro} Metzger provis kaj parte sukcesis en tio, disigi la katolikan Esperanto-junularon de la tradicio de la ĝenerala katolika Esperanto-movado, kaj fortigante la erarigajn ideojn pri Katolika Internacio bazita sur Esperanto, li volis alkateni ankaŭ nian junularon al sia oficejo. Samtempe li opiniis, havi idaron por sia unuiĝo, forpreninte tiun-ĉi idaron al IKUE, kiun li per tio senfine malutilis. Sed ni atentigas, ke ankoraŭ ekzistas la sepa Dia mandato, kaj tiu mandato postulas, ke oni redonu la forprenitan aĵon al tiu, al kiu ĝi apartenis.

S^{ro} Sappl volonte volus trompi la mondon per la diro, ke Moka estas tute memstara organizo. Nur parto de la junularo estas tiumaniere trompebla, sed ĉiuj, kiuj estas iomete pli longtempe en la movado, kaj kiuj travivis la lastajn terurajn jarojn de la katolika Esperanto-movado scias, ke la vera direktanto de la Moka estas D^{ro} Metzger, kiu ankaŭ diktatore faris sin dum la lasta jaro „pre-

zidanto" de Moka. Pro tio ni ne povas havi iun konfidencon al Moka. Ankaŭ ne Lia Kardinala Moŝto S^{ro} Princepiskopo Piffl, la alta Protektanto de E. K., kiu lastfoje benis la Moka Se Li estus sciinta, kiel Moka nuntempe nur estas la al IKUE malhavigita kaj al D^{ro} Metzger forliverita organizaĵo, Li ne estus beninta ĝin.

Moka en ĝia nuna stato estas io ŝanceliĝanta. Ĝi ne povas esti LA unuiĝo de la katolikaj junularunuiĝoj, ĉar la grandaj naciaj unuiĝoj ne volas rekoni ĝin kaj ĝi ankaŭ neniam povos atingi tion; Moka ankaŭ ŝajne ne volis esti la Esperanta katolika junularunuiĝo, ĉar en tiu-ĉi okazo ĝi estas la organizo de IKUE. Lastfoje certe S^{ro} Sappl vivnecese mem konstatis tion en germanlingva flugfolio, ke Moka estas la esperantiga centrejo de la katolika junularo. Ĉiu, kiu konas la historion de la okazintaĵoj de 1920, scias, ke en tiu okazo Moka apartenas fakte kaj rajte al IKUE, ĉar kiel EK pruvis en la N^o 124, kaj mi por la junula organizo en la N^o 125, la revolucia maniero de „Nia Sesa" en Hago ne povis krei rajton. Pro tio Moka apartenas al IKUE. Tiun-ĉi konkludon ankaŭ komprenas kaj rekonas la nuna prezidanto de Moka, S^{ro} Prof. Arnold; li nur hezitas redoni la proprajon de IKUE pro kialoj, kiuj kuŝas en la propreco de la cirkonstancoj de Svisujo. Certe ni rekonos tion, sed pro tio ni ne ĉesas niajn justajn pretendojn je Moka.

Sed ni postulas, ke Moka estu forprenita el la manoj de D^{ro} Metzger rilate lia servisto, S^{ro} Sappl, S^{ro} Sappl, kiu sentas sin „gvidanto" de Moka - oni nur bezonas legi liajn skribaĵojn - ne povas havi la konfidon nek de la plenkreskulaj katolikaj Esperantistoj, nek de la junaj, kiuj certe ne tiel bone povas pri-juĝi tion.

Ĉar, unue, S^{ro} Sappl estas kiel sia majstro, trompema. Ridinda estas lia klopodo, trompi la homojn pri sia persono.. Li nomas sin „profesoro h.c." Ĉiu Germanano ridas pri tio, ĉar ĉe ni nur ricevas tiun titolon plenmerititaj homoj de la scienco. La Esperantistoj en Italujo, kiuj faris la saman ekzamenon kiel S^{ro} Sappl, nomas sin „docento de Esperanto" Nur la dudekjarulo de Graz estas profesoro h. c.!

La profesoro h. c. eldonis lasttempe germanlingvan broŝuron: „Wir Katholiken und die internationale Jugendbewegung." Tre bone! Sed kion oni legas pri la socialistaj kaj la neŭtralaj junularmovadoj, tiu estas ja por junuloj bone informanta. Kion li diras pri Moka, estas plena de neveraĵoj kaj nur la ripeto de la germanlingva antaŭulo de tiu-ĉi broŝuro: „Was ist Moka?" Jam kiam li eldonis tiun-ĉi broŝuron, mi atentigis S^{ro} Sappl, ke li diris multajn neveraĵojn pri la historio de Moka. Tiam li diris al mi, ke li estis devigita de D^{ro} Metzger. Nun li ripetas konscie tiujn-ĉi neveraĵojn! Graz'a moraleco!

Plie la profesoro h. c. eldonis pluan broŝuron pri „Das Weltspachenproblem und die katholische Kirche” Certe meritplena! Tamen ni devas konstati, ke la broŝuro nur estas elĉerpita el la bonega broŝuro de S^{ro} Provincialo Meŝtan (1919) kaj de alia broŝuro „Wacht auf Katoliken!” de P^{ro} Madlener (1914) kaj plue nur propagandas la Metzgeran oficejon! En la antaŭparolo S^{ro} Sappl laŭ vera Metzgera maniero — li bone imitas sian majstron — citas la broŝuron de P^{ro} Meŝtan, sed ŝajnigas kvazaŭ li mem estus rajtigita, plibonigi la verkon de P^{ro} Meŝtan, dum li nur elĉerpas ĝin, kion li ne diras. Eble la profesoro h. c. jam estas iomete malforta en sia memoro, kiel ankaŭ en sia unua broŝuro „Kiel oni fondas Esperanto-grupon?” kie li parolas pri sia longjara sperto, li, kiu estis tiam unujara Esperantisto?

Pro tiaj kialoj ni katolikaj Esperantistoj devas protesti kontraŭ tiumaniera gvidado de nia junularo, kaj de organizaĵo, al kiu ni havas justan pretendon!

Pro tio ni petas S^{ron} Prof. Arnold, kiu estas la nuna Prezidanto de tiu-ĉi organizo, kaj al kiu ni havas plenan konfidon, liberigi la Moka el la manoj de la Graz'a oficejo kaj ni petas lin, redoni al ni, kio estas nia propraĵo. Ni scias, ke tio estas tre malfacila tasko. Sed se oni volas solvi la demandon, oni ankaŭ trovos la vojon.

Due devas esti ĉesigata la maniero de la Graz'aj oficistoj, influi la junularon kontraŭ la gvidantoj de la katolika Esperanto-movado. Pro tio mi proponas, ke la sciigoj por Moka estu publikigataj en EK. La Graz'aj oficistoj devas promesi anstataŭ ĵuri, neniel ion entrepreni de malantaŭen, kio estas antaŭvidebla.

La unuiĝoj, kiuj ne estas Esperantistaj, kaj nun apartenas al Moka bonvolu aliĝi al la Rom'a junular-Internacio, kiu ja, laŭ la flugfolio de S^{ro} Sappl efektive ekzistas. Certe ĝi estas tute ne preta, sed kion la junularunuiĝoj havas plu ĉe Moka? Moka ankaŭ en la nuna stato efektive ne estas alio krom la unuiĝo de la junaj katolikaj Esperantistoj,

Ankaŭ la altan Protektanton de Moka, S^{ro} Grafo K.G. Maylath, Episkopo en Rumanujo, kiu certe ne estas bone informita pri Moka, plue la Honoran Prezidanton, kiu estas same trompita de la Metzgeranoj, S^{ron} Prel. Giesswejn, ni urĝe petas, helpi la forigon de la malsana organiza stato en la katolika junularesperantista movado.

La movado de la junaj katolikaj Esperantistoj devas esti ideala, ni ne bezonas pagitajn oficistojn, eĉ tio estas malutilo. Estas ankaŭ forĵetado de fortoj, kiuj pli bone alie devas servi al la granda, sur multaj malgrandaj servoj bazita katolika afero. Kiam mi raportis al Lia anstataŭa Episkopa Moŝto, D^{ro} Senger en Bamberg pri la fondo de IKa, Li diris: Pro kio Vi bezonas pastron kaj apartan forton por la oficejo, li pli bone laboru en la anim-

zorgado, kie ni bezonas la pastrojn! Pro tio estis granda eraro, bazigi la katolikan Esperantomovadon, kaj same la junulan Esperantomovadon sur la oficista sistemo. Ni devas *ideale* labori por nia afero! Ĉar ni devas ĉiam scii kaj humile koncedi, ke ni estas tute apuda movado, kiu certe havas sian gravecon. Ĝi malgraŭ la manko de pagitaj oficistoj tute same bone florados!

Kaj al Vi, junaj katolikaj amikoj, mi ripetas mian alvokon: Kolektiĝu sub la verda stelo, en kies mezo estas la kruco en la papaj koloroj! Kolektiĝu sub la verda standardo de la P^{ro} Richardson, la fondinto de IKUE!

14-III-'22

D^{ro} Wilhelm Hotzelt.

Noto de la Red. de E.K. — Supran artikolon de D^{ro} H. ni cicevis tro malfrue por la Marta n^o; ankaŭ suban „klarigon“ de la Estraro de Moka. Post ricevo de tiu ĉi lasta mi demandis al D^{ro} H., ĉu li eble deziras ion ŝanĝi en sia supra artikolo; li preferis aldoni kelkajn vortojn al la „klarigo.“

* * *

Kiam jam estis preparita mia antaŭiranta artikolo, alvenis la jena klarigo:

MOKA
Mondjunularo Katolika
Katholische Weltjugendliga

Estraro:

Protektanto: Grafo K. G. Maylath, episkopo el Rumanujo
Honora Prezidanto: Mgr. Prof. Dr. A. Giesswein, Budapeŝt
Prezidanto: Prof. W. Arnold, Zug (Svisujo)
Ĉefsekretario: Prof. h. c. Hans Sappl, Graz

Klarigo

En N^o 125 de „Espero Katolika“ D^{ro} Hotzelt el Strullendorf atakas [?! Red. de EK] en artikolo „Esperanto kaj la katolika Junularo“ Mondjunularon Katolikan (Moka) dirante, ke ĝi estus kontraŭ-**IKUE**ana junula organizo kreita de D^{ro} Metzger per la mono malhavigita al la katolika Esperanto-movado. La subskribinta estraro de Moka sentas sin devigata doni kelkajn klarigajn:

Estas tute malvera, ke Moka estas organizo kontraŭ **IKUE**. La ĉefa celo de Moka estas la unuigo de la tutmonda katolika junularo por kunhelpi je la kreo de universala katolika junula internacio. Plue ĝi celas enkonduki la uzadon de Esperanto en la tutmondan katolikan gejunularon.

Estas malvera ke Moka ne havas alian nomon. Ni uzas jam de komence ekz. la germanan nomon „Katholische Weltjugendliga“ Cetere D^{ro} Hotzelt citas tute malnovan broŝureton publikitan en Novbr. 1920. (Komparu la lastan Moka-eldonaĵojn.)

Fakto estas, ke la hodiaŭa Moka jam ampleksas sendube la

tutan katolikan Esperantistan gejunularon, ke ĝi jam laboris efike dum 16 monatoj kaj kreis multajn valorajn instituciojn por la tutmonda katolika gejunularo, ke la plej multaj naciaj junulaj organizoj ekkonis Moka kiel organizon por la disvastigo de Esperanto inter la junularo, ke multaj-ankau aŭstriaĵ-episkopoj bonvolege benis la laboron de Moka.

D^{ro} Hotzelt konsiliĝu! La ŝancoj por Moka estas la plej bonaj. La kunlaborantaro kaj la delegitaro sufiĉe granda. Kun fajrega amo por nia Moka, por nia Moka-idealo' konfidante je Dio, ni daŭrigas ĝin por ke nia laboro alportu novan printempon, la sopiradon de ni ĉiuj.

W. Arnold, Prof.

Hans Sappl.

Prezidanto de Moka.

Afergvidanto kaj ĉefsekretario de Moka.

* * *

Kiu sufiĉe atente legis mian artikolon, jam scias ankaŭ la respondon al tiu-ĉi senkulpa protesto.

Ke mi nomis Moka kontraŭ-IKUEanan organizon, ankaŭ riproĉas S^{ro} Kemme en EK 126. Certe mi devas iomete priklarigi tiun-ĉi eldiron. Moka ne estas kontraŭ-IKUEana laŭ ĝia historio aŭ principo, kion mi ja mem pruvis en mia artikolo, sed laŭ ĝia evolado kaj nuna tendenco, kaj estos tiel longtempe, kiel ĝi estas alkatengita al D^{ro} Metzger, kaj al KM. Tion certe ankaŭ S^{ro} Arnold kaj S^{ro} Kemme ne neos! Kaj mi ne diris ion pri la junuloj, kiuj estas membroj de Moka, — pri iliaj katolikaj idealaj pensoj mi tute ne dubas, kaj mi tre ĝojas ke ili per S^{ro} Kemme eldiris, ke ili volas esti niaj amikoj kaj kunbatalantoj — sed pri la nunaj kaŝitaj kaj publikaj gvidantoj.

Kaj, S^{ro} Sappl, atentu, ke mi priskribis la historion de Moka, al kiu certe apartenas Via broŝuro „Was ist Moka?“, ĉu ĝi estas malnoviĝinta aŭ ne. Sed Vi ja donis al ĝi novan eldonon kun ĉiuj malnovaj neveraĵoj!

S^{ro} Sappl, kial Vi ne refutis mian historion de Moka? Kial Vi ne respondas en la nuna altrudita organo de Moka? Ĉar Vi ne riskas diri al Viaj anoj la veron!

Certe — mi ne bezonas multvorte akcenti tion — mi ankaŭ havas multan ĝojon pri Moka kaj ties laboroj kaj sukcesoj, sed kion fruktodonos tio al Moka, se mankas al ĝi la fundamentoj de la vero kaj de la justeco?

S^{ro} Arnold, S^{ro} Prezidanto de Moka, senkulpigu mian aperan vorton, sed mi devis diri tiujn-ĉi veraĵojn al la juna S^{ro} Sappl. Mi tre bedaŭras, ke Vi kunligis Vian nomon kun tiu de S^{ro} Sappl en la supra klarigo. Sed mi estas konvinkita, ke interkompreniĝo nur estas ebla, se la vero tute senkaŝita estos dirata.

Al vi, junaj katolikaj amikoj, mi ripetas mian alvokon: Forlasu

la al Vi altruditan „Blankan Krucon” kaj kolektiĝu sub la verda stelo, en kies mezo estas la kruco en la papaj koloroj!

D^{ro} Wilhelm Hotzelt.

Noto de la Red. de E.K. — Ni plue ricevis „Respondon” de S^{ro} Sappl pro la artikolo de S^{ro} Kemme en EK 126., p. 144. Bedaŭrinde ni ne povas presigi tiun „proteston” en nia EK. Oni scias, ke S^{ro} Kemme riproĉas al S^{ro} Sappl, ke tiu ĉi depost Aprilo 1921 neniam sendis al la Moka-komitato S^{ro} Kemme la liston je 100 delegitoj de Moka, kiuj laŭ aserto de S^{ro} Sappl tiam ekzistis. S^{ro} Sappl respondas, ke tiu listo aperis en EK 1921, n^o 4 [tamen tiu listo enhavas nur la nomojn de proksimume 50 deligitoj. — Red. de EK]. Al la riproĉo de S^{ro} Kemme ke li ne ankoraŭ ricevis el Graz la jam delonge pagitan akcion, S^{ro} Sappl respondas, ke S^{ro} K. havu paciencon — tiu akcio iam estos alsendata.

Fakte do la riproĉoj de S^{ro} K. estas tute pravaj, sed S^{ro} Sappl enterigas sian malpravecon sub tiom da akraj kaj grandaj vortoj, ke mi ne intencas presigi *tian* „respondon” en EK — des pli ne, ĉar S^{ro} Sappl povos ĝin (se li deziras) publikigi en KM., la propra „oficiala organo de Moka” — Cetere la artikolo de S^{ro} Kemme trovis ĝenerale interesigon kaj aprobon.

Lastmomente ni ricevas peton de S^{ro} Kemme, por *tamen* presigi la proteston de S^{ro} Sappl kune kun lia respondo al ĝi. Kiom interesa kaj instruiga estus la presado de la tuta polemiko, ni tamen decidis ne fari tion. S^{ro} Kemme kompreneble montras ke S^{ro} Sappl ne refutas lian artikolon. Sed el la respondo de S^{ro} Kemme ni sciiĝas pri la fakto, ke la sekretario de Moka S^{ro} Sappl tuj eksigis aŭtokrate S^{ron} Kemme el Moka — tiu eksigo tamen ne estas rekonita de la Prez. de Moka, Prof. Arnold. Tre interesa estas ankaŭ, ke S^{ro} Kemme proponas moke, starigi „Ligon de Ekskomunikitoj el Graz”, el kio oni povas konkludi, ke „ekskomunikoj” ŝajnas esti ordinara afero en Ika, Moka, ktp. — Vivu la libereco!

Ho!

Tempo!

Vi, senfina maro

por la junularo:

Ĝi ja tiel longe ŝipveturos,

Ĝis havenon riĉan ĝi enkuros.

Pro la idealoj kaj scivolo kaj atendo

ŝajnas tempa mallongec’ ridinda nur legendo.

Detranĉitaj la fluguloj kreskas ĉe la tempo,

ju pli longe forpasiĝis la vivoprintempo.

Gloro kaj potenco kaj feliĉo

ŝajnas vantaj ludo kaj fetiĉo.

Ĉio jam pasinta

estas forfluginta!

Tempo!

Ho!

Oficialaj Komunikoj

Deklaracio.

Ni jam en EK 126 sciigis, ke la pacproponoj el Graz estas senditaj al ni de S^{ro} Sappl, sed ke nenio ankoraŭ certigis nin, ke tiuj proponoj havas la konsenton de la Estraro de lia unuiĝo.

Ni jes scias, ke S^{ro} Mielert ekŝigis kiel prezidanto de la Graz'a unuiĝo, sed ankaŭ S^{ro} Heilker nenion komunikis pri sia opinio rilate la pacproponoj. Neeble do estas komenci tiamaniere la intertraktadon. Ĉar tamen ankaŭ ni kompreneble preferas pacon anstataŭ bataladon, ni ĉi-tie, kiel prezidanto de IKUE, komunikas la nurajn kondiĉojn, laŭ kiuj la paco estas eble.

1^e La t.n. IKUE de Graz ĉesigu sian ekzistadon, kaj ĝia estraro konsilu ĝiajn membrojn aliĝi al nia IKUE.

2^e Katolika Mondo forigu la kromtitolon „Oficiala Organo de IKUE”

3^e „Moka” publike deklaru, ĉu ĝi estas intenacia *Esperantista* asocio por la katolika junularo, aŭ, ĉu ĝi estas internacia asocio por la katolika junularo *diverslingva*, ankaŭ ne-Esperantista. En la unua okazo ĝi apartenas, kiel speciala Esperanto-asocio katolika, al nia IKUE kiel aparta fako kun propra estraro. En la dua okazo (kiam ĝi do uzas ne nur Esperanton, sed ankaŭ aliajn lingvojn kiel oficialajn), ĝi povas kompreneble ekzistadi ekster nia IKUE. Tiuokaze ĝi tamen tre utile povus kunlabori kun ni por tiom kiom rilatas ĝia Esperanto-fako. Kun Ika-mem tamen ĝis nur nenia kunlaborado estas ebla, ĉar la Nederlanda Episkoparo malaprobos ĝin.

4^e Okaze de akcepto de ĉi-tiuj proponoj, tio-ĉi estu publikigata en „Katolika Mondo” kaj en „Espero katolika”

Jen do laŭeble plej klare kaj resume niajn kondiĉojn, kies motivaĵon jam bone montris la antaŭaj numeroj de nia organo. Volonte ni neniigos ĉiujn diritaĵojn kiujn ili enhavas, se oni **klare pruvos** al ni, ke ili estas malveraj.

La Prezidanto de IKUE,
P. A. Schendeler.

Diversaj Sciigoj.

Nova Eklezia Cenzuristo.

Anstataŭ la bedaŭrinde mortinta P^{ro} Vroomans, L.E.M. Mons^{ro} A. F. Diepen, Episkopo de 's-Hertogenbosch, al mia peto 20-III-'22, bonvolis elekti 22-III-'22 kiel Eklezian Cenzuriston de „Espero Katolika“: Lian Paroĥestran Moŝton A. J. G. Verschure en Tilburg (Ned).

„Nia Sepa“

Ni denove atentigas, ke la lasta templimo por alsendo de proponoj pritraktotaj dum “Nia Sepa” estas **1 Majo 1922**.

S^{ro} L. Marquet (Bordaux) opinias ke „Nia Sepa“ devus okazi en Germanujo, 15-20 Aŭgusto aŭ 21-27 Aŭgusto. — S^{ro} Bernhard (München) miras, ke neniu ankoraŭ proponis Nürnberg (Bavarujo).

La antaŭpreparoj pri la loko de „Nia Sepa“ nun estas finitaj. La Estraro de IKUE decidu.

Nove fiksitaj abonprezoj de EK.

Ni komunikis sur la kovrilo de EK ke ĝis 1 Aprilo por eksterlando valorus la tarifo de UEA 1921. — Depost la apero de *tiu ĉi* numero por la malnovaj abonantoj (ricevintaj ĉiujn numerojn) aŭ tute novaj abonantoj kiuj deziras ricevi la tutan jarkoleton 1922, valoras la tarifo de UEA 1922.

Por la *novaj* abonantoj ni enkondukas *duonjaran* abonon de E.K. (Majo ĝis Decembro 1922).

Pri la detaloj vidu la kovrilon. Varbu novajn abonantojn! Ne prokrastu la pagon de la abonmono!

La Enhavo de EK

post *tiu ĉi* numero estos la kutima EK-enhavo. Do estos denun- evitataj polemikoj kun Graz kaj ĉio, kio apartenas al ĝi. Nur oficialaj komunikoj de la Estraro kaj eblaj mallongaj sciigoj aperos en EK mem. Se *necese* por defendi nian liberecon kaj niajn rajtojn — do nian vivon — ni eldonos apartajn broŝurojn. Esperu ni, ke estu finita la malagrabra interbatalo. Se interrilatoj inter la du organizaĵoj estonte estos necesaj, ili okazu nur inter la prezidantoj mem.

Insignoj de IKUE.

Kiel oni scias, la oficiala — oficiale de „Nia Dua“ en Hago akceptita — insigno de IKUE estas la verda stelo kun, en la mezo, kruco

en la papaj koloroj. Ni atentigas pri la anonco sur la kovrilo. Oni povas peti informojn kaj antaŭmendi la insignojn ĉe la Germana Oficejo de IKUE, Bamberg-Strullendorf; poŝtĉekbanko Nürnberg 14180. —

La dua IKA-kongreso

nun *tamen* ree okazos en Luxemburg. Pro „dusenca vorto“ kaj „erariga esprimo“ en KM 5 (nome: „*kun aprobo* de la Episkopo de Luxemburg“) tiu ĉi Episkopo ritiris, 11 Jan 1922, sian antaŭan, provizore donitan, *permeson*. (Vidu Lian leteron en EK n^o 126, p 165) La kaŭzo de tiu retiro de permeso estas do KM 5 mem. En KM 7, Graz, estus povinta silenti pri tiu malagrabra „eraro“ aŭ „erarigo“, aŭ lojale konfesi ke ĝi „eraris“ en KM 5. Ni tre bedaŭras ke, anstataŭ silento aŭ memkulpigo, KM 7 nun presigas neveran kulpigon pri aliaj, i.a. EK. Tiu ago de Graz kompreneble tute ne miras nin, sed **devigas** nin tie ĉi denove atentigi al la letero de la Luxemburga Episkopo en EK 126. En tiu ĉi okazo oni tute ne bezonas kredi la diraĵojn aŭ de EK, aŭ de KM — oni nur kredu la vortojn de tiu, kiu unue donis provizoran konsenton. due ritiris tiun konsenton por okazigi la duan IKA-kongreso en Luxemburg; — de tiu do, kiu la plej bone povas doni informojn kaj kiu estas plej kredinda, ĉar Li estas Princo de la Eklezio. Nu en tiu letero de la Luxemburga Episkopo *kiel nura kaŭzo tute klare estas indikita D^{ro} Metzger mem, kaj ne EK aŭ D^{ro} Hotzelt. Post tiu ĉi necesa korekto de nekorekta KM-informo mi finas la polemikon en EK per la konata diraĵo: „Mundus vult decipi (ergo decipiatur)!”* —

D^{ro} S.

Nia Organo.

Kara leganto, vi certe laŭkutime metis la akcenton sur la vorto „organo“. ĉu ne? Mi tamen nun intencas meti la akcenton sur la unua vorteto „nia“ Certe: „Espero katolika“ estas *nia* organo, la Organo de la tutmonda katolika Esperantistaro. En ĝi ni volas legi kio nin interesas kiel katolikaj esperantistoj, en ĝi ni volas diri kionni kredas utila por niaj samideanoj samreligiaj. Estas pro tio ke mi nun petas momenton vian atenton por la simplaj vortoj kiujn mi sekvigas.

Se mi trafolias la antaŭajn jarkolektojn de „Espero katolika“ mi renkontas la nomojn de diversaj kunlaborantoj, kiuj en la pasintaj jaroj sendis artikolojn por nia revuo. Diversaj el ili jam formortis, sed iliaj nomoj ĉiam ankoraŭ vekas nian dankon kun kora preĝo ke Dio rekonpencu ilian laboron por nia kara „Espero

Katolika,“ Kiom ajn granda tamen estas la nombro de kunlaborintoj, ni ĉiam rimarkas ke la nombro de tiuj, kiuj samtempe laboris al nia gazeto, estas malgranda. La plej granda parto de la artikoloj estas verkita de la redaktoro mem, plue ni kutime renkontas du-tri nomojn. Ankaŭ nuntempe tio okazas. Grandan sinsekvon da artikoloj skribis la redaktoro, ni, la legantoj, aŭskultas kion li diras, ĝuas pri lia flua kaj argumentriĉa stilo, aplaŭdas aŭ malaprobas... silente. Ĉu ni nenion havas por diri?

Ĉu vi neniam sentas bezonon esprimi vian opinion pri faktoj okazantaj en niaj rangoj? Ĉu vi nenion havas por rakonti al viaj samideanoj malproksimaj? Neeble! Vi certe pli bone ol ni estas instruitaj pri la movado de Esperanto inter la katolikaro en via lando, vi certe interesigus nin, rakontante pri okozintaĵoj aŭ okazontaĵoj en la katolika vivo de via ĉirkauaĵo. Nu, rakontu, mia amiko, ĉi-tie estas via organo, jen via parolejo, jen la loko kie vi povas peti informojn pri organizaĵoj alilandaj, kie vi povas doni klarigojn pri cirkonstancoj eble malfacile kompreneblaj por eksterlandanoj. Ĉi tie vi povas interesigi vian organon.

Granda jam estis la nombro de la personoj kiuj bonvolis laŭ mia unua peto akcepti la konsulecon por nia I.K.U.E.

Certe ili ĉiuj kunlaboros por diskonigi en siaj rondoj la celon de nia unuiĝo kaj la voloron de nia organo. Sekvu ankoraŭ multaj, muldegaj el plej diversaj regionoj; tiamaniere ni alvenos al plej taŭga organizado de la katolika esperantistaro. La sukceso de tiu mia alvoko kuraĝigas min fari duan peton al ĉiuj: kunlaboru al la enhavo de „Espero Katolika“. Se vi ne povas skribi longajn artikolojn, skribu mallongajn, skribu koncizajn informojn, eĉ telegramstile, sed: informu nin. La redaktoro certe ilin uzos por fari nian organon laŭeble interesa. Negrave, ĉu via nomo aperu sur la papero: ni nur laboras por la gloro de Dio per Esperanto. Kiu flue uzas la lingvon verku regule artikoletojn pri la plej gravaj aferoj el la katolika kampo en sia lando. Kiom interesaj povus esti ekzemple komunikoj sub la titolo: „Leteroj’ el Romo“, aŭ „la junula organizado en Germanujo“, aŭ „la katolika vivo en Usono“ Mi nur donas kelkajn titolojn kiuj hazarde venas en mia memoro, sed tiajn oni povas pripensi centojn. Ĉu vi volas helpi? Ne por plifaciligi la taskon de la redaktoro, tute ne, li mem estas kapabla plenumi la tutan kajeron. Ne: por laŭeble plej diversnacia fari la legaĵon de E.K., por montri, ke E.K. estas *nia* organizada organo, de ni ĉiuj,

P. A. S.



Leteroj el Nederlando.

I.

Sub tiu titolo mi klopodos ĉiumonate doni en mallonga resumo ĉion kion mi trovas en nederlandaj gazetoj, kio povas interesi la legantojn de E.K. Mi ĝin faros laŭeble plej simple, por esti facile komprenata de ĉiuj, kaj por instigi la legantojn de nia organo fari similmaniere.

En la antaŭa numero la redaktoro skribis pri verketo aperinta en la nederlanda lingvo sub la titolo „Al lingvo internacia“ Tiu libreto, verkita de frato Aŭgustino, bone konata de la ĉeestintoj de nia Haga kongreso, jam havas grandan sukceson. La ĉefaj gazetoj en nia lando kun laŭdo recensis ĝin, kaj multaj personoj: doktoroj, profesoroj kaj instruistoj per ĝi estas altiritaj al nia movado kaj komencis la studadon de Esperanto. Certe tio multe helpos al la instruado de nia lingvo en la lernejoj — nia plej proksima celo, espereble atingota per la Ĝeneva kongreso. —

De la 30a julio ĝis la 6a de aŭgusto okazos en Hago nacia katolika junularkongreso por montri kion oni ĝis nun atingis sur la kampo de la junuledukado knaba; same knabina; metiedukado; zorgo por krimula kaj neprizorgita junularo, por junuloj laŭkorpe aŭ laŭmense mankhavaj (surdmutuloj, blinduloj, invalidoj, malinteligentuloj); purreligiaj organizaĵoj (kongregacioj k.s.); specialcelaj organizacioj (kontraŭalkoholaj, kontraŭ-malmorecaj, metiaj). Dum la du lastaj tagoj okazos internacia kunveno kiu estos daŭrigo de Rom'a konferencó internacia de la pasinta jaro, kie fondiĝis provizore Internacia Sekretariejo por la RK Junulmovado. La fundiĝo de internacia junularligo, kiu tiam ne povis okazi pro politikaj malfacilaĵoj en Belgujo kaj Francujo, espereble estos plifacile efektivebla en nia neŭtrala teritorio. —

Ĉu la nuna impostado estas pravigebla laŭ kristana vidpunkto? Jen grava demando kiun faris inĝeniero Oriè en katolika gazeto de nia lando. Ĉu estas laŭ la kristanaj principoj, li demandis, ke oni demandas de la ŝtatanoj 40 ĝis 60 procentojn de iliaj enspezoj kiel imposto? Li ne volas per tio kulpigi la nunan registaron, sed, li daŭrigas: se unufoje estus konkludita ke nuntempe oni postulas maljuste-altajn impostadojn, tiam oni senpere faros la konkludon ke tia troalta impostado devas ĉesi, kaj, por ebligi tion, oni devos plimalgrandigi aŭ ĉesigi multajn troaltajn elspezojn, ekzemple por armeo kaj ŝiparo, detranĉi oni devas tiujn multkostaĵojn kaj precipe tiurilate ni, katolikoj, devas kompreni la postulojn de nia tempo. Oni ne pli elspezu ol oni povas pagi, tio estas la simpla vero, kiun la aŭtoritato — ŝtato, provinco, urbo — devas respekti, kaj pri tio ankaŭ valoras la konsiderado ke niaj impostoj transiris la limon de justeco. Grava demando, certe, ankaŭ ekster Nederlando, mi kredas.

P. A. S.

Pro kio la Papo ne malpermesas la militon?

(Daŭrigo)

Ni jam respondis al la demando: „pro kio *generale* ne estas malpermesita la militado.”

Oni tamen povas meti tiun demandon en alia rilato, kaj dum la milito (kaj verŝajne ankaŭ nun de la interesiĝanta leganto) ĝi fakte estis metita en alia rilato.

La demando tiam estis formulita jene: „Pro kio la Papo ne malpermesis la lastan mondmiliton?”

Kaj ĉar ĉiu ja komprenis, ke estus malsaĝeco deziri, ke la Papo *malpermesus* militon al la registaroj de nia tempo (estantaj tiom proprajuĝaj kaj senreligiaj) — ĉar tio estus senefika — tial oni formulis la demandon en ankoraŭ pli speciala formo: „Pro kio la Papo ne malpermesis al siaj submetitaj Katolikoj, partopreni al la milito? En ĉiuj militantaj landoj la nombro da fidelaj katolikoj estas certe tiel granda, ke la milito fakte estus fariĝinta nebla, se ĉiuj katolikoj estus refuzintaj voĉdoni militkreditojn, pagi milit-impostojn, partopreni al la milito. Pro kio la Papo ne uzis tiun influon?”

Kiam mi do metas la demandon tiel, kiu estas tiam la respondo?

La Papo nur povas *malpermesi* al la katolikoj, obei al ordono de la ŝtataj superuloj (la starigita aŭtoritato), kiam tiuj superuloj ordonus ion malbonan; tio ĉi estas vero, kiun la kateĥismo al ni instruas laŭvorte. La Papo do povus nur tiam malpermesi al la katolikoj „la” militon, kiam tiu milito estus malpermesita de la Dia morallego, aliavorte, kiam ĝi estus nejusta milito.

Kiu nun estas la fakta situacio? Ĉu la Papo povis almontri unu el la du partioj, kiu siaflanke havis la rajton, kaj alian, kiu faris la malrajton? Ĉu li tiam al la katolikoj de la nerajte militanta partio povus diri: „ne estas permesita al vi, partopreni al la milito?”

Kiu en 1914 povis prijuĝi, je kiu flanko estis la malrajto? Kiu povis tion dum la milito? Kiu povas tion nun?

Se vi identigas la malrajton, je la *kaŭzo*, la plej profunda kialo, de la milito, tiam estus eble, tiam kaj nun, nur unu konkludo: la kaŭzo troviĝas ĉe *ambaŭ* partioj, ĉar la kaŭzo de la milito kuŝas en la pekaj de la homoj. Estas precize Papo Benedikto XV, kiu jam en 1914 en sia unua granda Encikliko resumis la kaŭzojn de la milito en tiu ĉi unu ĝenerala: la senbrida avido al teraj bonaĵoj (al mono, ĝuado, honoro kaj potenco), kiu en nia epoko montriĝas precipe en tri formoj: en la manko de reciproka amo, en malŝato de ĉiu aŭtoritato, en la batalo inter la diversaj klasoj.

Tiu peko trakarcerigis la tutan socion, kaj la milito fakte estis nenia alia afero krom la traulcerado de la diversaj infektaj lokoj, kiuj estis formiĝintaj. Kaj post kiam la karceraj ulceroj unufoje estis malfermitaj, tiam la detruado de la malsaniĝo ne plu estis haltigebla...

Ĉu nu la Papo povis kaj rajtis diri al la katolikoj de *unu* el la partioj: fakte la milito estas por vi maljusta? Demandi estas tie ĉi respondi. —

Vi povas ankaŭ serĉi la malrajton en la *okazigo* de la milito en 1914. Ĉu oni povas tamen diri, ke unu okazaĵo eksplodigis la militon? Ĉu ni eĉ povas diri kiu „komencis”? En la konfuzo de 1914 tio tute ne estis ebla; la reciprokaj riproĉoj malebligis ĉiun prijuĝon; kaj je pli nuntempe ambaŭflanke estas publikigata, des pli klare montriĝas, ke ĉiuj partoprenintoj vidis la militon alproksimiĝanta kaj sin preparis je ĝi, sed ke neniu volis „komenci”, kaj ke ankaŭ neniu volis neokazigi la militon; tiel malfacilaĵoj, kiuj bone estus solveblaj, malkomprenoj, jes-aŭ-ne-volitaj malkorektaĵoj, relative negrandaj eraroj okazigis la gigantan mondkatastrofon. La pasioj, kiuj estis elkatenoigitaj, instigis al la fino.

Sed precize tial honesta juĝisto ne povus diri, ke unu el la partioj estis la nejusta atakanto; ĉe ambaŭ ekzistis kulpo, kaj multe da kulpo, kaj ĉe ambaŭ ekzistis atencita rajto. Kaj pro tio ankaŭ estas klarigeble, ke ĉiuj *bonafide* sentis sin atakitaj kaj ke ĉiuj fortike protestis kontraŭ la riproĉo, ke ili estus la atakantoj. (1)

Ĉu nu la Papo povus diri al unu el la partioj: vi estas la kulpulo? Kaj al vi do ne estas permesita militi?

Certe ne: li *devis* diri tion al *ambaŭ* partioj. Tion li faris kaj el tio li formulis siajn konkludojn.

Sed en formo, kiu estas pli praktika ol tiu, kiun postulus de li la al ni farita demando.

Kiam la Papo al la registaroj estus malpermesinta militi, tiam tiuj ĉi almenaŭ estus priridintaj lin; kiam li al la katolikoj de la diversaj landoj nur estus alkriinta; „vi devas ĉesi”, tiam eĉ la plej obeemaj estus prave dirintaj: „Sankta Patro, tio ne povas.” Kaj lia tute aŭtoritato estus malaperinta, lia bona influo neneigita kaj amason da malamikoj li estis kreinta por si mem kaj por la Eklezio.

Pro tio la Papo, en sia lumigita saĝeco kaj patra zorgemo, sciis trovi la rimedon, kiu konvenis kaj kun lia devo kiel Supera Majstro de la morallego, kaj kun la praktiko. En diversaj enciklikoj, le-

(1) Kiam vi aplikas tion al la kardinaloj kaj episkopoj de la diversaj landoj, tiam per tio estas klarigita, kiel je *ambaŭ* flankoj princoj de la eklezio, kvazaŭ blindigitaj, defendis, kiel senmakulan, la rajton de la propra lando, kondamnis la kontraŭulon, benis armilojn, ktp. En la militkonfuzo estis atentita nur — kaj tre pligrandigita — la propra rajto, kiu estis atencita, kaj estis neatentita aŭ senkulpigita la maljusteco farita de la propra partio.

teroj kaj paroladoj, en proponoj kaj alvokoj al la registaroj kaj al la popoloj, per starigo de ĉiaj help-organizaĵoj, li

1^e al ĉiuj senĉese memorigis la plej profundan kaŭzon de tiu ĉi milito ;

2^e senĉese predikis la principon, ke maljusteco neniam estas permesita ;

3^e ĉiam denove insistis, forlasi ĉiun nenecesan perforton ;

4^e propagandis la kompreniĝon, ke interkonsiliĝo devus finiĝi la konflikton ;

5^e ripete prezentis sian apogon kaj faris proponojn, por okazigi tiun interkonsiliĝon ;

6^e indikis rimedojn, kiuj garantios estonte pli bonan interkompreniĝon inter la popoloj (arbitracio, forigo de la deviga rekrutigo) ;

7^e plidolĉigis kaj limigis la terurajn sekvojn de la milito precipe per senripoza zorgo por vidvinoj, orfoj, vunditoj kaj militkaptitoj, ktp.

Tion ĉion faris la Papo dum longaj jaroj kun admirinde obstina persisteco. Ke ĝi ne havis pli da sukceso, vere ne estas kaŭzita de lia nesufiĉa fervoro aŭ de la nepraktikeco de liaj aranĝoj, ĉar tiuj ĉi efektive estis pli justaj kaj pli utilaj ol la agmaniero, kiun oni postulis de li per la demando: „Pro kio la Papo ne malpermesas la militon?”

Tio ĉi estas klare pruvita per la rezultato. La Papo ne estu senpere limiginta aŭ finiginta la militon per siaj zorgoj kaj admonoj, li tamen vekigis ĉie tian kreskantan konfidon en la Sankta Seĝo kaj en la Eklezio, ke li povis sanigi multe da militvundoj, ke li per tio precipe eksterordinare pliiĝis la inkliniĝon al la Eklezio, kiu fariĝas evidenta en la homaj spiritoj.

Ĝis longeco da jaroj pro tio la rememoriĝo je Papo Benedikto XV estos benata.

Tradukita el la apologia gazeto *Het Schild (La Ŝildo)*, Febr. '22.

Th. M. P. Bekkers, Sac. Voorschoten (Nederlando).

Recenzoj.

Poŝkalendareto por Esperantistoj 1922. Berlin, Friedrich Ellersiek.

Beleta libreto! Rekomendinda por ĉiu Esperantisto (nur Esperanto-teksto!) Notinda estas por ni katolikoj, ke inter la internaciaj unuiĝoj la adreso de IKUE bedaŭrinde malĝuste estas indikata, dum la indikoj pri nia organo estas ĝustaj. Bedaurinda manko estas la parte malĝusta, parte stranga traduko de kelkaj katolikaj festoj, tute riproĉinda estas la esprimo „punado al Mario” anstataŭ „vizitado de Mario” Eble en la proksimaj eldonoj povas esti korektigota.

D^{ro} W. H.

George Streidt: *Esperanto-Lehrbuch für Volksschulen*. Teil I Unterstufe (prezo: 10 Markoj). Teil II Oberstufe (prezo 15 Markoj). Eldonejo: Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig.

La eldono de tiu lernolibro estas tre aplaŭdinda. Unuflanke ni baldaŭ atendas la enkondukon de Esperanto el la popollernejoj kiel rezultato de la Genevaj konferencoj kaj de la klopodoj en tiu direkto de la Ligo de Nacioj. Aliaflanke tamen nin jam kelkafoje okupis la demando; laŭ kia metodo niaj instruistoj gvidos la Esperanto-instruadon? La plejmulto el la konataj de ni lernolibretoj nur estas verkitaj por personoj plenkreskaj; multaj antaŭsupozas bonan ideon pri la konsisto de la gepatra lingvo, malmultaj samtempe klopodas ankaŭ pritrakti la diversajn lingvo-elementojn, sed en ĉiuj la frazkonstruo, la dirmaniero klare montras ke la verkinto nur vidis antaŭ si plenkreskulojn, ne infanojn. Granda bezono do nuntempe ekzistas pri lernolibroj en kiu la lerno-materialo estas tiel priverkita, ke preskaŭ nerimarkite, plej simplamaniere la juna lernanto ekkonas la malmultajn regulojn de nia lingvo, ĉiam ripetante kaj praktikante la lernitaĵon.

Jen kion ni trovis en la lernolibro de Georg Streidt.-

Ĝi estas kunmetita laŭ la direkta metodo. Ne tutkonsekvence tiu metodo estas praktikita: la instruisto komence donas siajn klarigojn en la gepatra (tie-ĉi la germana) lingvo, kaj dum la unua parto A de ambaŭ volumoj nur donas Esperanto-tekston, la dua parto B enhavas la regulojn kaj ekzercojn germanlingve, kaj la tria parto C montras la vortlistetojn de ĉiu leciono, tradukante nur tiujn vortojn, kiujn la lernanto ne per si mem povus kompreni.

Precipe la ekzercoj estas bonegaj kaj klare ili montras ke la verkintaj estas personoj, kiu scias kion la infano bezonas: agrablan kaj simplan materialon el sia propra ĉirkaŭaĵo, bone aplikita por tuja uzado de la tutmonda lingvo. Jam la unua leciono devigas la junan lernanton esprimi sian penson en Esperanto: Direktu al via kunlernanto jenajn demandojn en Esperanto (ili estas donitaj germanlingve): Kie staras la instruisto? Kie estas la pordo? Kie estas la alta fenestro? Kie estas la dika libro? Kio kuŝas sur la longa benko?

Bildoj pliklarigas la tekston, kaj kiam la deka leciono pritraktis la manĝoĉambron, ni legas jenan ekzercon: Priskribu en Esperanto, kie kuŝas la tranĉiloj, la forkoj kaj la kuleroj.

La tuta A-parto en rakontoj, dialogoj kaj leteroj enkondukas nin en la vivo de du infanoj: Ernesto kaj Gertrudo. En la dua volumo Ernesto oficumas en komercejo kaj ricevas multajn leterojn de sia onklo kiu por siaj aferoj vojaĝas en multaj landoj, helpate de Esperanto kaj de la servoj de UEA. Tiamaniere la lernanto kvazaŭ senintence konatiĝas kun tiu nia plej bone organizita insti-

tucio, kaj farinte lerta Esperantisto certe ne forgesos sammaniere utiligi sian lingvosciadon.

Aperu baldaŭ en ĉiuj landoj tiaj lermolibroj. Ni urĝe ilin bezonas.
P. A. S.

Edmond Privat: *Karlo*. Eldonejo: Esperanto-Verlag. Berlin S 59.
Prezo 5 Markoj, por bonvalutaj landoj 7 M. 50.

La nomo de la verkinto jam garantias bonan stilon, puran Esperanton. Tion oni ĝuas, legante la libreton de l'komenco ĝis la fino. Ĝi konigas al ni la vivon de Karlo de lia naskiĝo ĝis lia edziĝo, kie la rakonto finas, do: ĝi estas vera romano! Ni devas admiri la lertecon de la verkinto, kiu per ĉi-tiu libro ne unualoke celis eldoni literaturan verkon, sed nur instruilon, legolibron por la partoprenantoj de Esperanto-kurso. Necese pro tio estas ke la frazkonstruo almenaŭ en la komenco estu simpla, ke ĝi nur enhavu vortojn ĉiutage uzatajn, ke ĉiu sciencaĵo estu evitata. Kaj malgraŭ tiuj malfacilaj problemoj, kiuj ŝajne devigus la aŭtoron doni tedan, neinteresan rakonton, S^{ro} Privat per sia „Karlo” konatigis nin kun persono, kun kiu ni kunvivas tra la tuta libreto, kaj kies aventurojn ni senintence komparas kun samspecaj okazintaĵoj el nia junaĝo. Pro tio la libro facile legas kaj kun plezuro oni ĝin uzos dum siaj Esperanto-kursoj kiel unua legolibro.

P. A. S.

Kursa Lernolibro, laŭ praktika parola metodo, de D^{ro} Edmond Privat Prezo 9 Markoj, por bonvalutaj landoj 13 M. 50.

Jen lernolibro kiu povas esti uzata tra la tuta mondo. Ĝi nur enhavas Esperanto-tekston. Kompreneble la instruisto devas nacilingve doni la necesajn klarigojn, sed la aŭtoro deziras ke li tion faru laŭeble plejmal multe. Nur kelkaj mallongaj frazoj kaj malmultaj vortoj bezonas tradukon por ebligi la lernanton kompreni la tutan sekvantan lecionon, kiu plejofte nur konsistas el demandoj kaj respondoj. Tiel la lernanto de l'komenco kutimas esprimi siajn pensojn en la mondlingvo, kio certe dum la unuaj lecionoj ne ankoraŭ estos facila, sed kio baldaŭ post taŭga ekzercado kaj sub bona gvidado alkondukos al mirindaj sukcesoj. Necesa tamen por tio estos la kunlaboro de lerta kaj senlaca kursgvidanto, kiu ĉiamaniere mem serĉos diversspecajn ekzercojn por la aplikado de la lernitaj vortoj kaj reguloj.

Tiamaniere uzita, la Privat'a lernolibro certe donos bonajn rezultatojn en kursoj por ne tro-junaj personoj. P. A. S.

Himnaro Esperanta, kompilita de Montagu C. Butler, dua eldono reviziita kaj pligrandigita, 145 paĝoj, bona papero, konvena formato. Prezo 1/7 afrankite (8 resp-kup.), rigida 2/1 afrankite (10 resp-kup.). Eldonanto British Esperanto Association, 17 Hart Street, London W. C. 1.

La aŭtoroj intencas ebligi „al Kristanoj el diversaj eklezioj kunveni sur neŭtrala tero por adoro komuna.”

Plej divers-religiaj kantaroj liveris materialon por atingi tiun celon: Baptista eklezia himnaro, Metodista himna libro, Kongregacia eklezia himnaro, Sanktaj kantoj kaj soloj, cet. Ankaŭ el Katolika kantareto kaj el Espero katolika estas elprenita po unu kanto.

La de ĉiu Esperantisto konataj kaj ŝatataj himnoj kiel La vojo, La tagiĝo, La espero, ktp. ne mankas.

Al la intenco de la verkisto nenion enlasi en la libreto „kontraŭ la Biblio kaj la Apostola Kredkonfeso” oni nur povas varme aplaŭdi.

Granda merito ankaŭ estas ke la lingva stilo estas simpla kaj facila kaj ke la traduko delikate redonas la nuancojn de la originalo.

La nova eldono estas certe valora akiraĵo por la Esperantistaro.

Pro Call. Preller, O. P.

N.B. Oni vidas el supra recenzo ke tiu ĉi libro ne estas eldono por katolikaj Esperantistoj

Pro Verschure. Cenz.

Muta Lingvo.

de P-ro Tezelin Halusa.

El la german-aŭstruja originalo*) esperantigita de P-ro F.M.

Tra l'herbejo riveret'
Plaŭdetante fluas;
Ĉe l' malforta saliket'
Ĝiaj ondoj klevas.
Jen de supre ĉielblu'
Ilin alrigardas;
Riveret' alridas ĝin,
Gaje ĝin alridas.
Ĉielblu' en onda bril'
Vin zorgeme diras:
Al ĉielo iras vi,
Se en kor' Di' loĝas.

*) trovebla en la poemareto: „Im Jugendland. Kinder-Lieder und Balladen“. (En la junularujo. Infanaj kantoj kaj baladoj). Wien 1917. Verlag (eldonejo) von Georg. Eichinger.

(Noto de la Redakcio de EK. Kvankam supra versaĵeto ne havas bonajn rimojn, ni volonte presas ĝin, pro ĝiaj beletaj ideoj kaj flua ritmo).

Nihil obstat.

A. J. G. VERSCHURE, Cens
Tilburg, 13 Aprilo 1922.

Evulgetur.

J. POMPEN, Vic. Gen.
Buscoduci, 13 Aprilo 1922